

| | | | |
|---|---|---|--|
| Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i> | Johann Wolfgang von Goethe, Trovaĵo <i>tradukita de Ri- chard Schulz</i> | Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden | Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Antoni Grabowski</i> |
| Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris. | Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'. | Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn. | Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris. |
| Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron. | Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'. | Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön. | Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steleto lumanta Aŭ blu-okuleto. |
| Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“, mi Ĝin aŭdis diri. | Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“ | Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“ | Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?” |
| Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis. | Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'. | Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus. | Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo. |
| Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floradas. | Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu. | Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort. | En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese. |
| ... | ... | ... | ... |

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.*

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.*

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.